

Leterkesto (1990/047/02)

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-009-B-3, 1990.04.26.28

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Nia leterkesto tre rapide repleniĝis. En tri monatoj alvenis en ĝin 436 mesaĝoj el 36 landoj sub formo de leteroj, poŝtkartoj, aŭdraportoj, komunikoj, raportoj kaj periodaĵoj. Nur nombrante la sendintojn de leteroj, poŝtkartoj kaj aŭdraportoj ni havas la agrablan taskon saluti 166 aŭskultantojn, kiuj troviĝas en 36 landoj.

A.- Jen ni komencas nian raporton listigante tiujn landojn laŭ la nombro de la skribintoj. En unua pozicio troviĝas lando najbara al Svislando: Germanio okcidenta kun 29 skribintoj, en la dua pozicio venas alia najbara lando, Francio kun 18 salutintoj. Honoran pozicion okupas poste Ĉeĥoslovakio: 14 salutintoj; Pollando: 11 kaj Italio: 10. Havas po 8 salutintojn Hispanio kaj Hungario; 7 Nederlando; po 6 Svedio kaj Svislando; 5 Britio; po 4 Belgio kaj Kanado; po 3 Bulgario, Ĉinio kaj Usono; po 2 Brazilo, Germanio orienta, Japanio, Kanariaj insuloj, Norvegio kaj Singapuro; fine sin manifestis per po unu salutinto Angolo, Aŭstralio, Aŭstrio, Finnlando, Irano, Islando, Israelo, Jugoslavio, Kolombio, Koreio suda, Luksemburgio, Meksikio, Rumanio, la itala insulo Sardo kaj Zairo.

Cl.- Al ĉiuj skribintoj el tiuj 36 landoj, kies nomojn vi aŭdos dum kelkaj elsendoj, ni diras nian dankon nome de Svisa Radio Internacia. Ili konsciigas nin, ke ni ne parolas antaŭ nura sonregistrilo, sed por multaj tre fidelaj geaŭdantoj, kiuj ne ĉiam tre facile kaptas niajn perondajn mesaĝojn. Ni listigis pli malpli alfabete tiujn perondajn amikojn, ne ĉiam sciante, ĉu la nomo, kiun ni elektas, estas reale la familia. Al la skribintoj ni petas unue tre legeble skribi.

A.- Bedaŭrinde ses mesaĝojn ni ne povis konsideri, ĉar ni ne povis deĉifri la nomojn de iliaj aŭtoroj.

Cl.- Kaj ankaŭ ni petas substreki la familian nomon aŭ skribi ĝin per majuskloj. Sed vi senpacienas, do ni komencu niajn salutojn, kiujn ni direktu al Josep ALTADILL en Tortosa (Hispanio), Jean AMOUROUX en Perpignan (Francio). Li skribis:

A.- "Ĉiufoje kiam eble, kun renovigata intereso, mi kaptas viajn esperanto-programojn."

Cl.- La esperanto-grupo Associazione Esperantista Trentina en Trento (Italio) esprimis siajn bondezirojn. Arne ANDERSENN en Göteborg (Svedio) certe fidelas ĉe sia radio-aparato. Nissa ANNAKINDT en Daggett (Michigan, Usono) aŭdis kun intereso la intervjuojn kun Tomasz CHMIELIK pri la formiĝo de la interna ideo de esperanto. Li estas poligloto.

A.- "Mi tre ŝatas la elsendojn de SRI en la esperanta, angla kaj germana lingvoj.

Cl.- Saluton al Jose Carlos BAHIANA MACHADO FILHO en Salvador-Bahia (Brazilo) kaj al Christoph BAYER en Waiblingen (Germanio okcidenta), kiu skribis:

A.- "Hodiaŭ mi volas prezenti min kiel vian aŭskultanton, kiu aŭskultas de tempo al tempo viajn programojn. Mi estas sendependa arkitektura inĝeniero, 45-jara. Kiel sendependulo mi

ne havas multe da tempo por lerni intense esperanton. Mi lernas esperanton pli vigle ol aliajn lingvojn. En 1987 mi estis veninta al esperanto - por tiel diri - sekvante post la centjara jubileo. Mi estis lerninta la komencojn de la lingvo laŭ Esperanto programita de Hermann BEHRMANN en Paderborn. Mi legas hodiaŭ MONATOn kaj provas legi diversajn librojn kiel "Mistero", "La Nova Realismo" ktp. Pro tio, ke mi ne havas multe da tempo, mi ne estas membro en klubo aŭ asocio. Mi estas esperantisto, kiu povas pli bone legi aŭ parte aŭskulti viajn elsendojn, kiuj alvenas ĉi tien pli aŭ malpli kvalite, ol paroli la lingvon. Pri tio mi estas ĉiam dankema adresato de frekvencaj kaj horaj informiloj."

Cl.- Tiuj sinprezentadoj estas fakte interesaj por ĉiuj. Ili ebligas reciprokan konatiĝon. Günther BECKER en Blieskastel (Germanio okcidenta) raportis pri la 34-a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo, en kiu Ulrich LINS prelegis pri la temo de sia libro La danĝera lingvo. La aŭdvida centro de Sarlanda Esperanto-Ligo vendas videofilmojn pri la okazintaj kulturaj semajnfinoj. Tiel estis eble kvazaŭ ĉeesti prelegojn de Régulo Pérez, István Szerdahelyi, Heinz-Dieter Maas, Adolf Burkhardt, Michel Duc Goninaz, Eugène De Zilah, Helmar Frank, ktp. Al interesatoj ĉu pri tiuj registraĵoj, ĉu pri la okazintaj kulturaj semajnfinoj en Sarlando, ni donas la ĉisekvan kontaktadreson:

A.- Günther BECKER, Alter Hangarten 2, D-6653 Blieskastel (Germanio okcidenta). Mi ripetas kun literumo.

Cl.- Norman BERDICHEVSKY en Rishon Le Zion (Israelo) skribis:

A.- "Mi treege ĝuas la esperanto-elsendaĵojn de Svisa Radio Internacia. La sonkvalito estas kutime tre bona kaj la enhavo de la paroladoj tre interesa. Mi taksas Svisan Radion Internacian kiel profundan kontribuon al la kreiĝo de harmonia internacia medio."

Cl.- Nia israela aŭskultanto Norman BERDICHEVSKY opinias, ke la eventoj en orienta Eŭropo grandigos la prestiĝon de la germana lingvo kaj eble malgrandigos la influon de la angla lingvo en tiu terregiono. Tio igos esperanton pli alloga alternativo por la Eŭropa Komunumo. Li havigis al ni fotokopion de granda artikolo pri Zamenhof kaj esperanto, kiun li skribis anglalingve kaj kiu aperis en la israela kultura revuo "Ariel". Tiun artikolon ni konservas en la esperanto-arkivejo CDELI. Al tiuj, kiuj sendas gazetteltranĉaĵon en rilato kun esperanto ni antaŭdankas kaj petas, ke ili ĉiam tre precize indiku la aperdaton, la nomon de la gazeto kaj la redakcian urbon. Tiujn sciigojn bezonas la arkivistoj prizorgantaj tiujn artikolojn. Fine ni diru, ke nia israela aŭskultanto petis specimenon de "Literatura Foiro" okaze de la elsendo, kiun ni dediĉis al tiu bonkvalita revuo.

Cl.- Claude kaj Andrée GACOND esprimas al siaj karaj geaŭdantoj bondezirojn por la nova jaro. Ĝis reaŭdo en 1991!